

Geografia nomenklature, 4-a parto
La landnoma demando laŭ Gaston Waringhien, 2-a parto
Claude Gacond, 285-a radioprelego, 1969.03.26 & 29

Parolas Claude Gacond.

La pasintajn semajnojn ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia fundamenta nomenklature.

Kaj la pasintan semajnon ni vidis, kiel naskiĝis la landforma sufikso **io** pro projekto pri neologismoj proponita de Zamenhof al Boirac, la prezidanto de la Lingva Komitato. Tio estis en 1906.

Ĉerpante niajn informojn el la studo de Gaston Waringhien : *La landnoma demando*, kiu troviĝas en la libro *Lingvo kaj Vivo*, ni raportas pri la disvastiĝo de la uzo de la landnoma sufikso **io**.

Unu monaton post la propono de Zamenhof, en decembro 1906, estas Gaston Moch, kiu siavice proponas la uzon de la sufikso **-i** : « *Mi proponas simpligon, konsistantan en la alprenado de nova sufikso -i por anstataŭi **uj** en ĝia geografia signifo.* » Kaj li aldonas, verŝajne sciante, ke Zamenhof mem ĵus faris la saman proponon kaj estante ricevinta la broŝuron *Homaranismo*, kie tiu sufikso estis proponita : « *Ni havas seriozajn motivojn supozi, ke ĝi estus aprobita de D-ro Zamenhof por ĝia granda oportuneco.* »

En julio 1907 Gaston Moch presigas la respondojn de la Lingva Komitato, kiu nombras 69 membrojn. 50 respondis. El ili nur 7 defendis la sufikson **ujo**, unu eĉ kun bedaŭro ; 40 aprobis aŭ ne malaprobis ĝian anstataŭiĝon per la sufikso **io**, kaj 3 proponis aliajn solvojn.

Tiun jaron okazis la afero de la Delegacio kaj kreiĝis la skismo **Ido**. En decembro 1907 esperante eviti skismon inter la Delegacio kaj la Lingva Komitato Zamenhof redaktas sian *Trian leteron cirkuleran*, en kiu ni trovas la frazon : « *Por la nomoj de landoj oni povas uzi sufikson **i** anstataŭ **uj**.* » Sed la 18-an de januaro 1908 la intertraktadoj kun la idistoj estis rompita kaj la *Tria Cirkulera Letero* neniam estis dissendita.

Aŭgusto 1909. Pri la Ido-skismo la anoj de la Lingva Komitato prokrastas ĉiujn proponojn pri neologismoj. Gaston Moch, kiu sisteme uzas la sufikson **io** por la landnomoj forlasas en 1913 la esperantan movadon por partopreni al la laboroj de la idista reformo.

Sed la sufikso **io** konservas en la esperanta movado varmajn defendantojn. Decembro 1918 : Hector Hodler, en *Esperanto*, la organo de UEA, decidas uzi la sufikson **io**. Lian ekzemplon baldaŭ imitas Teo Jung en sia *Esperanto Triumfonta* kaj poste Eŭgeno Lanti en *Sennaciulo*. Cart, Corret kaj Butler komencas vastan agitadon kontraŭ tiu iniciato.

Julio 1920. Cart sukcesas en sia kampanjo kontraŭ la landnoma sufikso **io**. Li voĉdonigas al la tiama Akademio jenan deklaron : « *La Akademio insiste kaj forte konsilas al ĉiuj Esperantistoj, kiuj konscias, ke disciplino estas absolute necesa por konservi la unuecon de nia lingvo (kaj aparte al la gazetoj), uzi nur la Fundamentan kaj tradician finiĝon **ujo** : Turkujo, Germanujo, Rusujo kaj tiel plu.* » Kaj tiu deklaro finiĝas per malveraĵo, ĉar fakte la Akademio neniam voĉdonis pri tiu temo. Aŭdu : « *La Akademio memorigas, ke jam en la jaro 1909 ĝi oficiale voĉdonis kontraŭ la sufikso -i por landnomoj.* »

Sed la adeptoj de la sufikso **io** ne obeas. Edmond Privat, je la nomo de kvin anoj de la Lingva Komitato : Fiŝer, Bünemann, Krestanof kaj Stojan, prezentas raporton favoran al la sufikso **io** kaj postulas pri ĝi oficialan voĉdonon de la Lingva Komitato. Cart estas tiam devigata komisi al la Direktoro de la Sekcio pri Komuna Vortaro, Emile Grosjean-Maupin, verkadon de raporto. Ni estas en junio 1921.

Geografia nomenklature, 4-a parto
La landnoma demando laŭ Gaston Waringhien, 2-a parto
Claude Gacond, 285-a radioprelego, 1969.03.26 & 29

En oktobro 1921 okazas la dissendo de la raporto de Grosjean-Maupin. Tiu raporto jene finiĝas : « *Mi konfesas, ke, komencante tiun ĉi esploron sen ia antaŭjuĝo, mi sincere esperis, ke mi povos proponi precizan solvon de la problemo. Sed, esplorinte metode kaj detale la demandon, kolektinte kaj komparinte la landnomajn radikojn en la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kunmetinte proksimume plenan liston da akceptindaj esperantaj landnomaj radikoj elektitaj laŭ la principo de internacieco [...] prove aplikinte ĉiun el la ses eblaj solvoj al ĉiu tiu radiko aparte, mi estas devigata konkludi, ke **nenia solvo** estas plene kontentiga, nek absolute kaj nediskuteble preferinda super la aliaj. [...] Nur la ĝenerala praktika uzado povos definitive decidi pri la afero, unue elektante inter la diversaj sistemoj tiujn, kiuj prezentas pli da bonaĵoj kaj malpli da malbonaĵoj kaj esceptoj, ol la aliaj, kiuj estos kredeble iom post iom forĵetataj. La Lingvaj Institucioj siaflanke devos plenumi gravan rolon, zorgante, ke oni ne malatentu la konsilojn de Zamenhof, ke oni respektu la spiriton de la lingvo, kaj precipe ke oni konservu ĝian elastecon kaj flekseblecon. [...] Oni tro facile parolas pri danĝera ĥaoso en multaj okazoj, kiam temas nur pri libereco kaj facileco, kiu, dum ĝi ne malhelpas la kompreneblecon kaj klarecon, estas tute sendanĝera. »*

Laŭ tiu raporto la Lingva Komitato estis devinta nenion decidi. Sed Cart ne povis akcepti. Li voĉdonigas rezolucion, kiu « malkonsilas » la uzon de la sufikso **io**. 74 anoj de la tiama Akademio estas por tiu malkonsilo, 6 kontraŭ. Cart triumfas. Li skribas : « *Mi firme esperas, ke ĉiuj esperantistoj [...] restos fidelaj al la Fundamento kaj al la Zamenhofa kaj tradicia uzado, **ne enkondukante novan sufikson**. »* Kaj li tuj dissendas al ĉiuj gazetoj ultimaton kun minaco pri bojkotado.

La plej gravaj esperantistaj organizaĵoj revenas al la uzo de la sufikso **uj**. Sed la esperantistaro, kiel kutime, ne okupiĝas pri la decidoj de la oficialaj rondoj. La sufikso **io** daŭre rezistas kontraŭ la oficialeco de la sufikso **ujo**.

Kun la malapero de la idoskismo malaperas ankaŭ la timo kontraŭ la neologismoj. Oni ne plu vidas en la uzo de la sufikso **io** mortdanĝeron por esperanto. Kiam aperas la *Plena Vortaro de Esperanto* de SAT en 1933 la sufikso **io** ne ankoraŭ estas registrita. Ĝia registrado okazos nur en la *Suplemento al la Plena Vortaro* en 1954. Jen la historia teksto : « *Rimarko : Kvankam por multaj landoj tiu sufikso liveras nomojn pli internaciajn ol **uj**, la Lingva Komitato dufoje rifuzis oficialigi ĝin kaj eĉ protestis kontraŭ ĝia uzado, kiu tamen disvastiĝis. Cetere, estas eraro uzi ĝin ĉe la landnomoj, kiuj ne respondas al difinita gento, kiel Kanado, Maroko, Venezuelo, kaj tiel plu. »*

Tiel finiĝas nia priskribo pri la disvastiĝo de la sufikso **io** por la landnomoj. La venontan semajnon ni parolos pri la internacia aspekto de la landnoma demando.

Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-